

La esperanto-grupoj en Svislando

Claude Gacond, 333-a radioprelego, 1970.02.25 & 28

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En mia funkcio de sekretario de Kultura Centro Esperantista, kiu estas nun kreata en Svislando, mi havis la okazon viziti plurajn lokajn grupojn en nia lando. Mi provos hodiaŭ doni miajn unuajn impresojn pri tiu kontakto.

A.- La unua impresado estas, ke inter la grupoj ne okazas kontaktoj. Tiu manko de kontakto estas grandparte la rezulto de la superokupiteco de la estroj. Estas apenaŭ, se ili povas plenumi ĉiujn taskojn, kiuj dependas de ili. Kiel ili ankoraŭ trovas la tempon por rilati kun almenaŭ la estroj de la najbaraj grupoj ?

Cl.- En Svislando ekzistas lokaj grupoj en Genève, Lausanne, Neuchâtel, La Chaux-de-Fonds, Bern, Basel, Zürich, Sankt-Gallen, Solothurn, Wil kaj Luzern. Ne ĉiujn mi ĝis nun povis viziti.

A.- Ni mem tre bone konas la grupajn problemojn, ĉar ni estas la animantoj de la grupo en La Chaux-de-Fonds.

Cl.- Tiu Esperantista Grupo en La Chaux-de-Fonds kunsidas ĉiujn triajn merkredajn vesperojn en saloneto de la stacidoma bufedo. Estas agrabla ĉambro, kiu estas je nia dispono.

A.- La meznombro de la kunvenantoj estas deko da esperantistoj. La komencantoj estas miksitaj kun la lertaj esperantistoj, kio malfaciligas la aranĝon de la programoj. Pro tio la malfacilaj temoj, la aranĝo de diskutoj, la tutvesperaj prelegoj estas ofte anstataŭataj de lumbildaj prelegetoj kaj de facilaj raportetoj.

Cl.- La unua tasko, kiun tiu grupo devus solvi, se ĝi volus kreski, estas aranĝi du specojn de kunvenoj : unu por la komencantoj, unu por la lertaj esperantistoj. Sed ĝis nun niaj laborfortoj ne permesis tiun duobligon de la kunvenoj.

A.- Tiun saman problemon oni retrovas en ĉiuj grupoj, eĉ kiam okazas kunvenoj ĉiusemajne. Neniu grupo kapablas ĝis nun organizi apartajn kunvenojn por la komencantoj. Pro tio en ĉiuj ni aŭdis plendojn kaj de la komencantoj, kaj de la lertaj esperantistoj. La unuaj trovas la kunvenojn senesperige malfacilajn. La aliaj dezirus pli interesajn temojn.

Cl.- Verŝajne la lokaj grupoj povos progresi, nur se ili kapablos kunlabori por solvi tiun problemon. Se ekzemple en ĉiu grupo oni laborus al la programigo de interesa vespero por komencantoj, tio farus aŭtomate dekunu vesperojn, kiujn poste oni povus aranĝi en la dek-unu grupoj. La grupanoj pretigante tiun vesperon ekkonscius pri tiu problemoj kaj pri sia respondeco. Du aŭ tri grup-kunvenoj estus veraj labor-kunvenoj, kaj poste por tuta jaro ĉiuj grupoj en Svislando havus la eblecon facile aranĝi grup-kunvenojn por siaj komencantoj.

Cl.- La grupo, kun kiu ni havas plej multe da rilatoj, ĉar ĝi troviĝas en najbara urbo, estas la Esperanto-Societo de Neuchâtel.

A.- Ĝiaj kunvenoj okazas en la atendejo de la prezidanto, kiu estas infan-kuracisto. Seso da esperantistoj ĝenerale vizitas la monatajn kunvenojn, kiuj okazas unu ĵaŭdan vesperon.

Cl.- Dum tiuj kunvenoj la ĉefa okupo estas la traduk-arto. Kun la invito al la kunveno la societanoj ricevas francan tekston. Ili devas ĝin esperantigi. En la kunveno frazon post frazo oni komparas la diversajn tradukojn. Poste oni legas la tradukon de la plej lerta esperantisto.

A.- La komencantoj ne kuraĝas partopreni tiujn malfacilajn kunvenojn. La lertaj esperantistoj ne volas malaltigi la nivelon de tiuj kunvenoj por plaĉi al la komencantoj. Estas alia sinteno ol en La Chaux-de-Fonds rilate al la problemoj komencantoj-lertuloj.

La esperanto-grupoj en Svislando

Claude Gacond, 333-a radioprelego, 1970.02.25 & 28

Cl.- Tamen en Neuchâtel oni devos trovi solvon al ĝi. Tie mi gvidas kurson, kiu baldaŭ finiĝos kaj kiun dekdu personoj partoprenas.

A.- En Lausanne ekzistas Laborista Esperanto-Societo, kiu kunvenas ĉiujn lundajn vesperojn en la Popol-domo. Apud tiuj kunvenoj kunsidas ĉe kafejo ekslernantoj de esperanto-kurso. Ili deziras lertiĝi ekstere de la grup-kunvenoj.

Cl.- Tiun ĉi vintron ni vidis formiĝi du aliaj tiaj grupoj sekve al du kursoj. Se en tiu urbo ne povos okazi kunvenoj por komencantoj, oni riskas vidi kreiĝi pluraj grupoj, kio iom post iom povos konduki al konfliktoj.

A.- Pro tio Kultura Centro Esperantista proponis inaŭguri la unuan aŭd-vidan prelegon por komencantoj en tiu urbo, kie esperanto progresas. Estos metodo por instigi la komencantojn kunlabori, same kiel iliajn kurs-gvidantojn.

Cl.- En Ĝenevo la Esperanto-Grupo « La Stelo » kunsidas ĉiun trian ĵaŭdan vesperon en tre bela kongresejo. Tiu grupo aperigas gazeteton, kiu nomiĝas *Brasik-folio*.

A.- Kio ĉefe impresas, kiam oni vizitas tiun grupon, tio estas fermita amikeco, kiu interligas parton el ĝia anaro, kaj tute certe malhelpas la asimiladon de la novuloj.

Cl.- Tiun fenomenon oni retrovas en aliaj urboj, sed estas en Ĝenevo, ke ĝi min plej impresis. Se en grupoj oni sentas la bezonon konservi iun fermitan amikecon, oni devus aranĝi, apud la ĝeneralaj kunvenoj, amikajn kunvenojn.

A.- Tion komprenis la gvidantoj de la Esperanto-Societo en Zürich. En tiu urbo la grupa kunveno okazas ĉiujn duajn ĵaŭdajn vesperojn. Apud tiuj kunvenoj, kiuj grupigas inter dek kaj tridek esperantistojn, okazas pli intimaj kaj pli improvizitaj kunsidoj en kafejoj kaj eĉ unu libera posttagmezo kun ekskursetoj.

Cl.- Ŝajnas, ke en tiu urbo oni ne sciis doni celon al tiuj pli malgrandaj kunvenoj. Ni aŭdis de du aŭ tri membroj la deziron vidi unu el tiuj kunvenetoj fariĝi stud-kunveno, kie oni povus intimiĝi kun la esperanto-literaturo kaj kun la nuancoj de la esperanto-gramatiko.

A.- Sed tiu deziro estas malfacile kontentigebla, ĉar neniuj sentas sin vere kompetenta por gvidi tian kunvenon.

Cl.- En Basel la grupo kunsidas en la oficejo de stacidoma estro. Tio alportas tute apartan atmosferon. La grupanoj estas ĉefe maljunuloj, kaj ni vidis junulinon, kiu, pro tio, rezignis lerni esperanton.

A.- En preskaŭ ĉiuj lokoj ni rimarkis tiun tendencon. En Lausanne ĝi esprimiĝis per kreiĝo de junulara grupo, kiun bedaŭrinde la laborista grupo malentuziasme akceptas. Ankaŭ la grupo en Bern ĉefe grupigas maljunulojn.

Cl.- En aliaj prelegoj ni prezentos aliajn aspektojn de la esperantista vivo en Svislando.

Cl.- Vi aŭdis gesinjorojn Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-